



Dana Fervojiŝto estas organo de Dana Esperantista Fervojiŝta Asocio (DEFA)

Prezidanto:

Jan U. Niemann
Hovedvagsstræde 9 E, 1
DK-3000 Helsingør
tel 71 70 63 83
aŭ 71 72 32 42
niemann@kabelmail.dk

Kasisto: Karen K. Olsen
Manøvej 6
DK-4700 Næstved
tel 55 72 73 77
ĝiro 547-1044

Redaktantoj: Jan kaj Lene
Niemann
Vidu adreson supre.

Preso: HVS9E1

Redaktifino por venontaj numeroj de Dana Fervojiŝto:

1/11-2013
15/2-2014

Dana 3

Fervojiŝto

ISSN: 1397-9914

66a jareldono

Oktoebro 2013

Enhavo:

- paĝo 2 Togfonden.dk
- paĝoj 3-7 Temo de la jaro
- paĝoj 8 Aktivecoj
- paĝoj 9-10 La arto krei kon-traktojn
- paĝo 11-12 La 83^a IC4
- paĝo 13-14 La 98^a UK
- paĝo 15 Forpaso

66^a IFK – majo 2014



Ne forgesu ... aliĝilo kaj aliaj informoj haveblas ĉe la prezidanto,



IC4-trajno en Libio

vidu pp. 11 (fonto: ic3.dk)

La trajnfonduso, Togfonden.dk

Togfonden DK estas infrastrukturfonduso je valoro de 28,5 mia. DKK (ĉ. 3,8 mia. EUR). Ĝi estis proponita komence de marto ĉijare, kaj ni rakontis iomete pri ĝi dum la IFEFA kongreso en Artigues en majo.

Estas grandioza plano, kiu temas pri elektrizado de granda parto de la dana fervoja reto, novaj pontoj, renovigitaj reloj, kaj ĉiuj tiuj investoj donu pli mallongan vojaĝdaŭron inter la grandaj kaj gravaj urboj kaj per tio pli da pasaĝeroj en la publika trafiko, ĉar la publika transporto iĝos taŭga alternativo al privat-aŭta transporto, kiu ne estas same mediamika kaj cetere pli danĝera. Ĉio estu preta en 2025.

La diskuto dum la somero temis pri la financado, - la registaro, kiu proponis la Togfonden.dk, voias financi la projekton per imposto pagita de la entreprenoj, kiuj ekspluatas rezervujoj de fosila energio (oleo kaj gaso) en la dana parto de la Norda Maro. Sed aliaj partioj diras, ke la antaŭkalkuloj pri la enspezoj de tiuj firmaoj estas multe tro optimismaj, kaj dum la monatoj la delagacioj de diversaj partioj iris en kaj el la oficejon de la impostministro.

Tamen, finfine meze de septembro la registaro kune kun du partoj (la plej 'dekstra' kaj la plej 'maldekstra' en la parlamento) faris interkonsenton pri financado de tiu grandega projekto, kaj nun ni povas komenci pensi pri la multaj part-projektoj, kiuj ĉiu estas granda en si mem.



Laŭ la plano en 2025 povos veturi grandrapidaj trajnoj inter la plej gravaj danaj urboj

Forpaso

Jerzy Formal 1926 – 2013

Jerzy estis laŭ profesio aktoro ĉe la nacia teatro en Varsovio kaj krobe aktiva en la esperanto-movado en- kaj ne malpli eksterlande. Li kaj lia edzino *Zofia* estas konataj kaj ŝatataj personoj por multaj kaj farigis en la movado fama paro: ŝi estis historiisto, verkisto kaj prelegis pri plej diversaj movadaj temoj, li prezentis teatraĵojn – unu-aktaj estis lia specialaĵo. Li multe kunlaboris kun diversaj aŭtoroj kaj tradukistoj kaj same uzis sian propran grandan sperton, ankaŭ rilate al pantomimo. Dum multaj kongresoj kaj aliaj aranĝoj dise en la mondo ili bele kontribuis.

Ni en DEFA konatigis kun 'la ge-Formaloj' pro ilia filino *Tamara*, kiu loĝas en *Farum* norde de Kopenhago. Lige al iliaj vizitoj ĉe ŝi *Zofia* kaj *Jerzy* preskaŭ ĉiam disponis al la DEFA Kopenhago-Klubo vesperon, kaj ni estas multaj, kiuj gardas neforgeseblajn memorojn pri tiuj vesperoj.

'Aniario', 'Sopiro – Laboro – Espero', 'Wolfgangeri' kaj 'La Granda Koncento' estas titoloj, kiuj ĉe multaj memorigas pri interesaj kaj ujuitraj vesperoj en la diversaj kunvenejoj de DEFA Kopenhago.

Ankaŭ dum Nordia Fervojoista Esperanto-Kunveno en Ry, Jutlando, *Jerzy* kun *Zofia* partoprenis kaj kontribuis.

Niaj pensoj iras al *Tamara* kaj al la filino *Maja*.

Honoro al la memoro de *Jerzy*.

DEFA

Jerzy, kiel ni konas lin, antaŭ kapita publiko



La kompletigo de la konstruaĵo necertis ĝis la nacia registaro en 2008 decidis plene financi la reston de la konstrukostoj por la duone konstruita koncertejo. La konstruaĵo ricevis sian nomon en la Tago de la islanda Muziko la 11-an de decembro 2009, antaŭ ĝi nomiĝis iom longe Tónlistar- og ráðstefnuhúsið í Reykjavík (en Esperanto pli-malpli "Sonaŭskulta kaj konferenca domo en Rejkjaviko"). La konstruaĵo estas la unua nur tiucele konstruita koncertejo en Rejkjaviko. Ĝi gastigas la Islandan Simfonian Orkestron kaj la Islandan Operejon.

Ernst Q. el Aŭstrio raportas, ke okazis fervojista kontaktkunveno, kiel ĉiam. Ernst skribas:

La kontaktkunveno de IFEF okazis dimanĉe posttagmeze kaj en ĝi partoprenis 15 homoj el ok landoj. La gvidantino, vicprezidantino s-ino Sylviane Lafargue bonvenigis la partoprenantojn kaj legis salutvortojn de la prezidantino s-ino Rodica Todor. Ŝi raportis pri la en majo 2013 en Francio okazinta IFEF-kongreso kaj prezentis klarigojn pri la venonta kongreso en San Benedetto del Tronto (Italio). Fine oni diskutis pri la eblecoj por kontaktigi fervojistojn kaj gejunulojn. Fakekskurso pro manko de fervojinstalaĵoj ne okazis, tamen kelkaj gekongresanoj malkovris etan lokomotivon en la haveno de Rejkjaviko. (Pri ĝi en DF4).



'Minør' en la haveno de Rejkjaviko

Temo de la jaro

Ankaŭ por 2013 ni sukcesis decidi pri temo ... ni elektis SAMIDEANOJN. En Esperantio ni multe parolas pri samideanoj – ni ja ĉiuj estas – sed ni trovis kvar personojn ekster Esperantio, kiuj estas kun Zamenhof samtempuloj (proksimume) kaj samideanoj – en la senco, ke ili volis la pacon kaj ĉiu en sia maniero laboris pri tio. Do, antaŭĝoju konatiĝi kun kelkaj interesaj kaj por la mondo signifaj personoj.

Pac-Bertha – pioniro de la paca movado – en Aŭstrio kaj en la mondo

Bertha von Suttner naskiĝis en Prago la 9an de junio 1843 en bohemia nobela familio. Ŝi estis aŭstra kaj fariĝis pacbatalanto, pacesploristo kaj verkisto. En 1905 ŝi ricevis kiel la unua virino la Nobel-pacpremion.

Bertha naskiĝis kiel grafino Kinsky von Wchinitz und Tettau. La patro mortis tuj antaŭ la naskiĝo 75-jaraĝa, kaj ŝi vivis sola kun sia patrino en la aŭstra-hungara aristokratio, al kiu ili apartenis. Kiel juna knabino Bertha lernis plurajn fremdajn lingvojn, ŝi ludis muzikon kaj multe vojaĝis.

Kiam la heredo de la patro estis foruzita (ne malplej pro ludmanio de la patrino), Bertha dungigis en 1873 ĉe riĉa familio en Vieno, kies kvar filinojn ŝi instruis. Ŝi enamiĝis en la plej juna filo de la familio, Arthur Gundaccar von Suttner, kiu estis sep jarojn pli juna ol ŝi.

Post kelkaj komplikaj iloj sekrete edziniĝis en 1876, kaj pro la malakcepto de la gepatroj ili sen mono translokiĝis al Kartvelio, kie ili loĝis ĉe grafino. Ili ambaŭ sin vivtenis per verkado de distraj romanoj kaj per tradukado.



En 1877 ili ambau komencis labori kiel ĵurnalistoj. *Bertha* verkis precipe eseojn kaj novelojn por la aŭstraj tagĵurnaloj. Post ok jaroj, en 1885, ili translokiĝis al Vieno, kie ili kunakordiĝis kun la familio, kaj kie ili transprenis la familian kasteleton en Harmannsdorf en Malsupra Aŭstrio.

Post reveno al Aŭstrio *Bertha* plue verkis, kaj nun ŝi koncentriĝis je temoj kiel 'paca socio' kaj pacismo. La unua libro, kiu temis pri interhomama respekto kaj liberaj agoj, '*High Life*', aperis en 1886.

Nelonge post tio ŝi informiĝis pri la asocio *International Peace Arbitration and Peace Association* (internacia pac-organizo). En la aŭtu-

La 98a UK okazis.

En la islanda ĉefurbo kolektiĝis pli ol mil kongresanoj, kaj ili pasigis enhavoriĉan kaj bone aranĝitan kongreson en rava kaj bela lando.

Pri la kongresejo rakontas Vikipedio:

Harpa estas moderneca koncertejo kaj konferencejo en Reĵkjaviko, la ĉefurbo de Islando. La malfirma koncerto okazis la 4-an de majo 2011. De la 20-a ĝis 27-a de julio 2013 la kunvenejo estis la kongresejo de la 98-a Universala Kongreso de Esperanto (sekve ĝi ankaŭ videblas maldekstre en la kongresa emblemo).

Harpa estis desegnita de la dania arkitekta firmao Henning Larsen en kunlaboro kun la dana-Islanda artisto Olafur Eliasson. La strukturo konsistas el ŝtala kadro tegita per vitraj paneloj de malsamaj koloroj. La konstruaĵo estis origine parto de reordigo de la areo Austurhöfn al projekto nomita "Monda Komerca Centro Reĵkjaviko", kiu estis parte forasita kiam en 2008 fortiĝis financa krizo. La projekto antaŭvidas 400-ĉambran hotelon, luksajn apartamentojn, vendejojn, restoraciojn, parkejon kaj novan sidejon de la islanda nacia banko Landsbanki.



La koncertejo Harpa en Reĵkjaviko

La trajnunuo estu parto de la grandioza plano pri var- kaj pasaĝertrafiko tra Libio, sed finfine, pro la enlanda milito, kiu komenciĝis en 2011, ĉio ĉesis, kaj ĝis nun ne estas ebleco denove trakti tiun planon.



Versajne la '83a IC4-trajnunuo' ne aspektus tiel interne, se ĝi estus irinta al Danio

Do, la fajna IC4-trajnunuo staras nun, kvar jarojn poste, 'ie en la libia dezerto'. Alia problemeto estis, ke fakte tiu trajnunuo estas 'la 83a dana trajnunuo' - DSB nun ricevas monan rekompenson por tiu 83a.

no 1889, 46 jarojn aĝa, ŝi eldonis sian unuan por-pacan romanon '*Die Waffen nieder!*' (mallevu la armilojn). Ŝi priskribis la timegon pri milito vidata de ŝi mem kiel edzino, kaj per tiu aliro ŝi trafis grandan nombron de homoj. Tiu libro fariĝis la plej granda sukceso – 37 eldonoj kaj tradukitan en 12 lingvojn.

Ŝi partoprenis la viglan diskuton pri milito kaj paco. Ŝi difinis 'paco'n kiel naturan kaj normalan staton kaj 'milito'n kiel rezulton de homaj eraroj kaj misfaroj.

Pli kaj pli ŝi involviĝis en la paca movado – en Venecio, kie ŝi kun la edzo dum kelka tempo loĝis, kaj hejme. Ŝi partoprenis plurajn packonferencojn internaciajn. La 3an de junio 1897 ŝi transdonis al imperiestro *Franz Joseph I* liston kun subskriboj, kiuj pledis por internacia juĝejo. Tamen, tio ne efektiviĝis.

Jam en 1902 ŝi sola, sen la edzo, vojaĝias al packonferenco en *Monaco*, kaj poste en la sama jaro ŝia edzo forpasis pro severa malsano. Pro grandaj ŝuldoj *Bertha von Suttner* devis translokiĝi al Vieno. Ŝi plue verkis kaj debatis kaj montris sin kiel apoganton de la evoluteorio de *Darwin*. Ŝi partoprenis la inaŭguron de 'Internacia instituto de la paco' en *Monaco* en 1903, dum ŝi en 1904 estis inter la gravaj partoprenantoj de Internacia Virina Konferenco en Berlino, kaj ŝi travojaĝis Usonon pro la packonferenco en *Boston* – ŝi vojaĝis de urbo al urbo kaj prelegis ĝis trifoje tage. La reputacio kuris antaŭ ŝi, kaj ŝi estis invitita al kunveno kun la prezidento (*Roosevelt*). '*Pac-Bertha*', kiel oni nomis ŝin, revenis entuziasma de la sep-monata vojaĝo, surprizita, ke la pacmovado de Usono estis multe antaŭ tiu de Eŭropo, - eĉ oni instruis pri paco en la lernejoj.



Germana poŝtmarko memore al *Bertha von Suttner*

La 10an de decembro 1905 *Bertha von Suttner* ricevis kiel la unua virino la Nobel-pacpremiojn, kaj en aprilo la venontan jaron ŝi iris al *Kristiania* (nun *Oslø*) por la ceremonio. *Alfred Nobel*, kiam li inaŭguris sian pacpremiojn, jam pensis pri ŝi kiel la unua ricevanto, ĉar li iomete konis ŝin, sed nur kvin 'fojoj' poste ŝi ricevis la prestiĝan premion.

Ŝi daŭre pledis por paco kaj provis informi al la mondo pri la danĝero pri milito, kaj en 1912 ankoraŭfoje ŝi travojaĝis Usonon kaj en pli ol 50 urboj prelegis pri la minacoj kontraŭ la paco.



Bertha von Suttner, sidanda kiel dua de maldekstre, kun aliaj konataj pac-batalantoj dum la monda paca kongreso en Munkeno, 1907.

Bertha von Suttner mortis en junio 1914, nur kelkajn semajnojn antaŭ la komenco de la Unua Mondmilito, pri kiu ŝi senĉese provis averti la mondon. Oni diras, ke ŝiaj lastaj vortoj estis: 'Mallevu la armilojn – diru al ĉiuj!'

Oni poste honoris en multaj manieroj ŝian nomon – memorpladoj, poŝtmarkoj, moneroj kaj –biletoj, lernejoj kaj stratoj portas ŝian nomon aŭ porteton. En Vieno Ruĝa Kruĉo-oficejo portas la nomon *Bertha von Suttner*. Pri ŝia vivo temas la filmo *'Herz der Welt'* (Koro de la Mondo).

La instituto *Bertha von Suttner-Stiftung* ekde 1993 informas pri laboras por kaj subtenas projektojn pri paco, interkompreniĝo kaj internacia kunlaboro.

Ĝis la 10a de decembro 1905 – '12799 *von Suttner*'.

IC4-trajnujoj – finfine ĉiuj trajnujoj alvenis al Danio

En 2000, kiel certe ĈIUJ legantoj scias, la danaj ŝtatejoj DSB mendis 83 IC4-trajnujojn dizelajn ĉe la itala firmao *AnsaldoBreda*. Ni multe kaj ofte ekde tiam skribis pri la malfruoj, malfacilaĵoj, teknikaj mankoj k.s. de tiuj trajnujoj, sed nun, en septembro 2013, finfine ĉio mendita troviĝas sur dana tero.



Se vi bone rigardas en Libio, vi trovas IC4-trajnujon.

KAJ TAMEN ... el la 83 menditaj trajnujoj Danio ricevis nur 82. La klarigo estas, ke en 2008 subskribis la itala ĉefministro *Silvio Berlusconi* kaj la gvidanto de Libio *Muammar Ghadafi* amikecan kontrakton inter la du landoj. Jam antaŭe Italio ludis gravan rolon rilate al fervojkonstruo en la nordafrika lando, kaj en 2009 okaze de la datreveno de la Amikeckontrakto la 30an de aŭgusto *Berlusconi* donacis al *Ghadafi* IC4-trajnujon tre belan kaj tre lukse ekipitan. Ekzistis ankoraŭ ne reloj por tiu trajno en Libio, kaj pro tio *AnsaldoBreda* liveris ne nur la trajnujon, sed ankaŭ mil metrojn de fervojlinio, por ke ĝi bele montru sin meze en la dezerto.

Antaŭ nelonge aperis en la franca fervojsulteno *'La vie du Rail'* (LvdR, julio 2013), artikolo pri 'simila' afero, nome la trajnprojekto *Fyra*, kiu estas nederland-belga kunlaboro pri grandrapida trajno. La *Fyra* devus veturi inter Amsterdamo kaj Bruselo kaj Amsterdamo kaj *Breda* per rapideco de 250 km/h. Oni faris kontrakton kun *AnsaldoBreda* en 2004, ke la entute 19 trajnunuoj estu liverataj fine de 2007. Ili veturu por la ekspozicio *Eurailspeed* en Amsterdamo en marto 2008. Sed, fine de 2007, nek la trajnoj, nek la reloj estis pretaj, kaj sekvis 'dana historio' kun malfruoj, obstakloj ktp.

Fine de majo 2013 la belgaj fervojoj *SNCB* oficiale informis al *AnsaldoBreda*, ke oni sin retiras de la kontrakto. *NS* (nederlandaj fervojoj) sekvis post parlamenta kunveno komence de junio, kaj ambaŭ registaroj planas okazigi esplorojn pri la severaj problemoj.

Ŝajne oni en Belgio kaj Nederlando faris pli bonan kontrakton pri liverado de la V250-materiale ol en Danio pri la IC4-trajnoj, tiel ke oni povas eliri de la kontrakto, kiam liverado ĝustatempa kaj kvalita ne okazas. Sed, denove en decembro 2012 DSB kaj *AnsaldoBreda* faris ankoraŭ interkonsenton pri la lasta liverado, kaj se tiu interkonsento ne estos plenumita en septembro 2013, DSB povas sin retiri de la kontrakto. La problemo estas nur, ke oni uzis jam grandegajn monsumojn por 'ripari' la trajnunuojn, kaj oni ne havas kontentigan nombron de trajnunuoj, kaj tiuj, kiujn oni havas, ne estas sufiĉe altkvalitaj.



Nova kaj malnova trajno

Fonto:

LvdR, julio 2013
Wikipedia

Unu surbendigon de 1904 de ŝia voĉo oni konservis, - ĝi troviĝas en la aŭstra mediateko.



Bertha von Suttner diris i.a.:

Neniu saĝa homo volus forigi ink-makulojn per in-ko aŭ ole-makulojn per oleo. Nur sangon oni volas ĉiam per sango forlavi.

Fonto: Wikipedia



Se vi emas studi, lerni kaj distriĝi, provu eniri la mondon de

edukado.net

Vi trovos taskojn, ludojn, novaĵojn, kursojn kaj multajn aliajn aferojn, se mankas al vi esperantomaterialo.

En la kopenhaga klubo siatempe mi plurfaje turmentis vin per taskoj de edukado.net©

LEN



Aktivecoj de DEFA:

Ekde septembro ni denove kunvenas unufoje monate. La kunvenoj okazas en Køge ĉe Astrid kaj Erik aŭ en Næstved ĉe Karen. Ni renkontiĝas je la 18-a horo, kune mangas, priraktas taskojn, kiujn sendas Heinz Hoffmann pri terminologiaj aferoj, kaj ni strebas fari artikolojn por IF kaj Dana Fervojoisto kaj prezentojn por la venontjara kongreso.

Ni kunvenos la

15an de oktobro kaj 26an de novembro

Por pliaj informoj kaj aliĝo, turnu vin al la prezidanto.

Bedaŭrinde ni devis pro diversaj kialoj prokrasti la planitan ekskurson ĝis la printempo. Vi aŭdos pri tio poste.

Aliaj Esperanto-aktivecoj en Danio:

Kopenhago

Kunvenoj de KEK (prezidanto: Peter Wraae, tel 46 49 60 16, retadreso kek@esperanto.dk) okazas en Kulturhuset, Toms-gårdsvej 35, 2400 Kbh NV. Vidu ankaŭ www.esperanto.dk

Arhus

Kontaktulo pri DEFA: La prezidanto.

Kunvenoj okazas kunlabore kun la Esperantoklubo de Århus en Seniorcentret, Østergade 30, dua etaĝo je h 19.30, la lastan jaŭdon de la monato.



La arto krei kontraktojn.

En 2000 DSB subskribis kontrakton kun la itala trajnfabrika *AnsaldoBreda* pri liverado de 83 trajnunuoj por la dana interurba trafiko. La trajnunuojn devis liveri *AnsaldoBreda* en la daŭro de kelkaj jaroj, sed ĉiuj devis esti en Danio en 2006, - sed kiel vi eble scias (de niaj multnombraj kontribuoj dum kongresoj k.s.), la liverado eĉ ĝis nun ne estas en ordo – multaj teknikaj malfacilaĵoj estis, kaj okazis diversaj akcidentoj, kiuj postulis ĉesadon portempan de la trafiko kun la trajnoj. En 2009 *AnsaldoBreda* kaj DSB faris kompromison, kiu signifas, ke la trajnunuoj estas liverataj al *Arhus* kaj *Randers*, kie oni finpretiĝas ilin. La historio estas kvazaŭ senĉesa ... ĉeno de obstakloj teknikaj, malfruo post malfruo, - kaj la materialon por la finpretiĝado *AnsaldoBreda* ne ĝustatempe liveras al la metitejoj en *Arhus* kaj *Randers*.



La de belgaj kaj nederlandaj fervojoj medita rapidtrajno